

# Informilo de Marto 2014

Numero 9, Marto 2014

## La Prezidanto de UEA prelegos ĉe lingva simpozio

“Lingvo kaj Egaleco” estos la temo de simpozio organizata de la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, kiu okazos ĉe 777 United Nations Plaza mardon, la 29-an de aprilo. La simpozio pritraktos neegalecojn en edukado, neegalecojn en internacia komunikado, kaj demandojn pri lingvopolitiko je nacia kaj internacia niveloj. Profesoro Mark Fettes, nove elektita kiel prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, prezentos la ĉefan paroladon. Fettes, kiu estas fakulo pri lingvaj demandoj en edukado, precipe rilate minoritatojn, estas profesoro pri edukado ĉe la Universitato Simon Fraser, en Vankuvero, Kanado. Lin akompanos pluraj elstaraj parolantoj, kiel ekzemple Terrence Wiley, prezidanto de la Centro de Aplika Lingvistiko en Vaŝingtono, kaj Daniel Ward, redaktoro de la usona revuo Language Magazine. Fakuloj el pluraj landoj kontribuos referaĵojn, interalie el Aŭstralio, Belgio, Britio kaj Aŭstralio.

Temas pri la dua simpozio organizita de la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, kies unua simpozio okazis antaŭ du jaroj en la sama loko. La grupo aparte interesiĝas pri apliko kaj administrado de la oficiala lingvopolitiko ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj ankaŭ pri laŭokazaj solvoj por lingvaj diferencoj bezonataj en situacioj kiel ekzemple packonservado, evoluigaj projektoj kaj publika informado.

Pliaj subtenantoj de la simpozio estas la Universitato de Hartford kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj, kiu eldonas la revuon Lingvaj Problemoj kaj Lingvoplanado (LPLP). Detaloj pri la simpozio troveblas ĉe <http://www.languageandtheun.org/>.

## La Ĝenerala Direktoro de Unesko festas Internacian Patrilingvan Tagon en ok lingvoj – inkluzive Esperanton

Ŝirmado kaj antaŭenigo de patrinaj lingvoj estas ŝlosiloj al monda civitaneco kaj aŭtentika reciproka kompreniĝo, laŭ Irina Bokova, Ĝenerala Direktoro de Unesko, en ŝia mesaĝo okaze de la Internacia Tago de la Patrino Lingvo, la 21-an de februaro. “Kompreni kaj paroli pli ol unu lingvon kondukas al pli granda kompreno de la abundaj kulturaj interagoj en nia mondo,” ŝi aldonis. Ŝia mesaĝo, kiu emfazis edukadon radikiĝintan en la kultura kaj lingva heredaĵo de junaj homoj, estas forta konfirmo de la multlingvismo subtenata ankaŭ de Universala Esperanto-Asocio. Laŭ ŝi, ekskludi lingvojn implicas ekskludi tiujn homojn, kiuj parolias tiujn lingvojn. La ĉi-jara mesaĝo de s-ino Bokova aperis en la ses oficialaj lingvoj de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, plus du pliaj lingvoj gravaj pro sia simboleco kaj pro sia praktika graveco – ŝia propra patrino lingvo, la bulgara, kaj la Internacia Lingvo Esperanto. Tiu kunlabora rezulto atestas pri la forta rilato inter Unesko kaj Universala Esperanto-Asocio kaj la streboj de la Asocio subtene al lingvaj rajtoj

<http://www.unesco.org/new/en/international-mother-language-day/>

*Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:*

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041

[www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org)

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041